

William Wordsworth,  
Dafodiloj

*tradukita de Krys Ungar*

Mi vagis sola kiel nub'  
Altfloras super la kampar'  
Kaj tiam tuj aperis trup'  
De dafodiloj; ora ar'  
Apud la lag', sub arba tend'  
Flirtis kaj dancis en la vent'.

Senbreĉe kiel astra bril'  
Sur Lakta Voj' flagretas, jen  
Sterniĝis ili en defil'  
Senfine laŭ la laghaven'.  
Rigardon kaptis la balanc'  
De dekmil kapoj en la danc'.

Apudaj ondoj dancis, sed  
Triumfon gajnis floroj ĉi,  
Devigis gajon de poet'  
Plej joviala kompani':  
Mi rigardadis sen atent',  
Ke min riĉigos la prezent'.

Ĉar ofte, kiam kuŝas mi  
Penseme, aŭ en menslangvor',  
Ekfulmas ili tra l' konsci' -  
La beno de solema hor';  
La koro pro pleniga ĝu'  
Kun dafodiloj dancas plu.

*Traduko de la Angla poemo "The Daffodils" de WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 - †1850) en Esperanton de KRYS UNGAR (Krys Bottrill).*

*Arg-39-632 (2009-09-20 15:01:36)*

William Wordsworth,  
The Daffodils

I wander'd lonely as a cloud  
That floats on high o'er vales and hills,  
When all at once I saw a crowd,  
A host of golden daffodils,  
Beside the lake, beneath the trees  
Fluttering and dancing in the breeze.

Continuous as the stars that shine  
And twinkle on the milky way,  
They stretch'd in never-ending line  
Along the margin of a bay:  
Ten thousand saw I at a glance  
Tossing their heads in sprightly dance.

The waves beside them danced, but they  
Out-did the sparkling waves in glee: -  
A poet could not but be gay  
In such a jocund company:  
I gazed - and gazed - but little thought  
What wealth the show to me had brought.

For oft, when on my couch I lie  
In vacant or in pensive mood,  
They flash upon that inward eye  
Which is the bliss of solitude;  
And then my heart with pleasure fills  
And dances with the daffodils.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas WILLIAM WORDSWORTH (\*1770 - †1850).*

*Arg-39-73 (2003-10-17 22:02:21)*

*Origina anglalingva teksto de WILLIAM WORDSWORTH (1770 - 1850)*